

LA TRANSFERKURTENA KORAMIKINO

vortoj/muziko. E. Rovere (Manŭel)

Iam havis mi koramikinon
trans la ferkurtena landlimo;
ni korespondadis kelke da jaroj kun ĝojo.
Niaj sentoj iĝis tre intensaj, naskiĝis Amo granda.
Estis bona trejnado por novlernanto
de l'Internacia Lingvo Esperanto.
Fine venis Universala Kongreso en ŝia lando.
Renkontiĝis ni, neglektis kongreson kaj mi memoras
 pri la belaĵoj, kiun mi lernadis de ŝi:
 pasio kaj amo sur herbejo, sub lunradi'
 kaj la nokto, kiam ni dormis sub stelkovrilo.
Vilaĝeto, domo tre modesta,
gento ege ĉarma kaj honesta,
ĉiuj ĝojis regali min per manĝaĵoj, drinkaĵoj:
ŝinko aŭ fromaĝo, biero aŭ brando... sed mi forgesis
 la guston kaj parfumon de ilia bonaĵ',
 memoras mi nur la poezion en la verdaĵ'
 kaj la fojon, kiam demetis ŝi la ĉemison.
Perletere flugis varma sento,
revis ni, ke venos la momento
kiam falos la ferkurteno, revivos libero
kaj, senbare, povos ni renkontiĝi kaj ĉiam resti kune.
Falas la mureg' sed ŝi plu ne amas min,
granda festo por ĉiuj, ne por mi en Berlin',
la tuta mondo ĝojas, celebras la tuta homaro,
sangas mia kor', kolektas riunaĵojn de nia amo.
 Samtempe falis ŝia amo kaj la mureg'.
 Ĉu povas forblovi ĉion de liber' la venteg'
 el virina koro? Kolektas mi ruinaĵojn.
 Kie jam nun troviĝas tiu koramikin'?
 La dezir' de ŝiaj varmaj, dolĉaj kisoj, sen fin',
 memorigos min
 pri mia amo perdita.